LKZ-Z: Mis padres fueron médicos e igual que el abuelo fueron oculistas. Yo pasé mi infancia en una atmósfera serena y familiar, en la casa que anteriormente, durante los últimos años de su vida, fue la casa de mi abuelo. Mi padre trabajó en el que fue gabinete del abuelo, cambiando casi nada en él, toda la casa estaba llena de recuerdos. Yo, probablemente por mi 10º cumpleaños o posiblemente más temprano, heredé la imponente colección de sellos, (el abuelo tenía correspondencia con todo el mundo), ¡la cuál fue mi orgullo y fuente de mi superioridad en el campo de la historia y la geografía! Si se trata acerca de otros recuerdos, el más grande lo despertó en mí el armario de cristal del salón, donde bajo un cristal pude admirar entre otras; la orden francesa de la Legión de Honor, la orden española de Isabel La Católica, y también pruebas troqueladas de monedas "spesmilo", las cuales, según mi abuelo, ¡iban a servir como moneda internacional a comienzos del siglo!

HK: ¿Cuál es el origen de su nombre: Zaleski?

LKZ-Z: Ya en los primeros días de la ocupación alemana, a comienzos de octubre de 1939, todos mis familiares que llevaban el nombre ZAMENHOF, esto es; mi padre, mi madre

mia patrino kaj ankaŭ ambaŭ fratinoj de mia patro: Zofia kaj Lidia, estis malliberigitaj. Mi mem evitis malliberigon nur "pro eraro". Post kelkaj monatoj, en januaro 1940, mia patro estis mortpafita en Palmiry... Do ŝajnis al mi prudenta akcepti (elpensi) alian familinomon; sub tiu nova nomo ni travivis plimulton de militjaroj, mi agis en rezista movado, mi amikiĝis kun multaj homoj... Dum jaroj efektive mi estis Kristoforo ZALESKI. Ĉar tamen en la fundo de la koro mi restis Ludoviko ZAMENHOF, do baldaŭ post finiĝo de la milito, mi legalizis mian duoblan nomon.

HK: Jam kiel infano vi partoprenis en la monda E-movado. Kiel vi rememoras tiun tempon?

LKZ-Z: Mi rememoras belajn vojaĝojn, kiuj tiam malofte eblis por miaj samaĝuloj; mi vizitis Svedion, Italion, Aŭstrion, Hungarion, Jugoslavion... Por la dekjara (sufiĉe putra) knabo estis mirige vojaĝi sur Mediteraneo: Neapolo-Tripoli-Palermo-Genovo; mi rajdis sur kamelo en la Libia Dezerto; ĉie bonvenigata kiel "eta princo".

HK: Ĉu dum la milito kaj okupacio E-movado iamaniere agis?

LKZ-Z: Esperanto-asocioj en Okcidento organizis moralan kaj materialan helpon por "fratoj havantaj bezonojn" sur okupitaj terenoj; tio okazis pere de neŭtralaj landoj: Svedio kaj Svislando.

HK: Esperanto, konata verŝajne en ĉiuj landoj post la Dua Mondmilito ŝajnis precipe populara en socialismaj landoj, ĝi estis specifa "fenestro rigardanta la mondon".

Kio ŝanĝiĝis tiurilate en la 1990-aj jaroj?

LKZ-Z: Efektive, en la muroj, kiujn "la malvarma milito" konstruis inter nacioj, Esperanto estis fenestreto, kiu ebligis al loĝantoj ĉe la orienta flanko laŭeble libere kontakti Okcidenton, tiuj kontaktoj estis ununuraj inter maloftaj aliaj, kiujn oni rigardis kiel relative "senkulpaj". La E-himno "La ESPERO"

y también ambas hermanas de mi padre: Zofia y Lidia fueron encarcelados. Yo mismo evité la cárcel solamente "por error". Después de algunos meses, en enero de 1940, mi padre fue fusilado en Palmiry... Por consiguiente, me pareció prudente aceptar (inventar) otro apellido; bajo ese nuevo nombre nosotros pasamos la mayoría de los años de guerra, yo colaboré en el movimiento de resistencia e hice amistad con muchas personas... Durante años efectivamente fui Kristoforo ZALESKI. Pero ya que en el fondo de mi corazón seguí siendo Ludoviko ZAMENHOF, pues inmediatamente después del final de la guerra, yo legalicé mi doble nombre.

HK: Ya como niño usted participó en el Movimiento Esperantista. ¿Cómo recuerda usted ese tiempo?

LKZ-Z: Recuerdo bellos viajes, que entonces rara vez eran posibles para los de mi edad: visité Suecia, Italia, Austria, Hungría, Yugoslavia... Para el muchacho de 10 años (bastante consentido) era maravilloso viajar por el Mediterráneo; Nápoles-Trípoli-Palermo-Genova; yo cabalgué en camello por el desierto de Libia; en todas los sitios fui bien recibido, como "un pequeño príncipe".

HK: Durante la guerra y ocupación, ¿el Movimiento Esperantista actuó de alguna manera?

LKZ-Z: Las asociaciones Esperantistas en Occidente organizaron ayuda moral y material para los "hermanos necesitados de ayuda" sobre terrenos ocupados, eso tuvo lugar por medio de países neutrales: Suecia y Suiza.

HK: El Esperanto, conocido al parecer en todos los países, después de la Segunda Guerra Mundial parece principalmente popular en países socialistas, ello fue una específica "ventana contemplando al mundo". ¿Qué cambió a este respecto en los años 1990?

LKZ-Z: Efectivamente, en los muros, que "la guerra fría" construyó entre naciones, el Esperanto fue una ventanita, que hizo posible a los habitantes del lado oriental, en lo posible, contactar libremente con Occidente, esos contactos fueron únicos entre otros infrecuentes, que se contemplaron como relativamente "inocentes". El himno de Esperanto "La Es-



Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof, nepo de la Majstro, Hanna Konopka, Prezidantino de la Fondaĵo ESPERANTO, kaj Teodor Konopka, elstara esperantisto el Wroclaw.

vokas la homaron faligi "murojn de miljaroj". Paradokse, la muroj falis kune kun ties fenestroj, kiuj plu ne estis bezonataj; ĉiuspecaj interhomaj kontaktoj plifaciliĝis, ne necese pere de Esperanto. Eĉ se, en tiuj kondiĉoj, E-movado en la landoj el malantaŭ la antaŭa muro iom kvietigis, tucerte neniu prudente pensanta esperantisto ploras pro tio. Ja Esperanto ne estis kreita kiel la fina celo, sed kiel kompreniĝilo; - Esperanto ne estas komerca marko, kiu devus batali kontraŭ konkurencaj markoj, konkurante por atingi la samajn rezultojn..

HK: En la epoko de kreskanta rolo de la angla lingvo en la mondo, fariĝanta pli kaj pli la universala internacia lingvo, kion vi pensas pri estonteco de Esperanto?

LKZ-Z: Mia lasta frazo verŝajne jam respondas vian demandon. Mi deziras nur aldoni kelkajn vortojn, kiujn mi aŭdis, antaŭ kelkaj jaroj, dum gazetara konferenco verŝajne en Tokio, diritaj de iu japana lingvisto:

... efektive, angle, aŭ hispane, homoj interkompreniĝas, sed pere de Esperanto - interamikiĝas... Sendube tiu diraĵo estas iomete vera; kaŭzas tion la fakto, ke Esperanto estas ne nur lingvo, sed vehiklo de la komuna ideo por interparolantoj. Krome, kiel neŭtrala lingvo, Esperanto egaligas interparolantojn, ne permesante superi por la flanko, por kiu uzata lingvo kiel internacia estas gepatra lingvo. Ĉe alia okazo mi rakontos, kiel mia troiga fido pri scipovo de la angla lingvo de miaj interparolantoj kelkfoje igis malagrablajn miskomprenojn en miaj profesiaj kontaktoj...

HK: Esperanto -kiel vi menciis- estis kreita kiel la esprimo de penado por homoj de diversaj nacioj, religioj kaj gepatraj lingvoj povis pace kunvivi, ĝi estis kreita kiel la esprimo de kredo je reala toleremo. Vi iniciatis interalie la ideon de Medalo de Toleremo, kiun realigas Fondaĵo Zamenhof. La Kapitulo de la Medalo atribuis ĝin al la papo Johano Paŭlo la Dua. Kial?

LKZ-Z: La unua Medalo de Toleremo estos enmanigita al la papo por honorigi liajn noblajn agojn sur la kampo de ekumenismo. Ja ekumenismo estas la esprimo de religia toleremo, esprimo de respekto fare de la Romkatolika Eklezio al aliaj religioj. La medalo estos enmanigita al Johano Paŭlo la Dua ĉe la finiĝo de la ekumena liturgio de vorto, ĉe la finiĝo de la meso, kiu estos celebrita samtempe sur sep altaroj de sep religioj. Permesu al mi menci, ke jam antaŭ preskaŭ cent jaroj ZAMENHOF diris en sia "Preĝo sub la verda standardo", ke

... Kristanoj, hebreoj kaj mahometanoj

pero" llama a la humanidad a derribar "muros milenarios". Paradójicamente, los muros cayeron junto con sus ventanas, que nunca más fueron necesarias; toda clase de contactos recíprocos se hicieron más fáciles, no necesariamente por medio del Esperanto. Incluso hasta en esas condiciones, el movimiento Esperantista en los países de detrás del anterior muro algo se apaciguaron, ciertamente ningún esperantista, pensando prudentemente, llora por eso. En verdad el Esperanto no fue creado como el objetivo final, sino como instrumento de comprensión; el Esperanto no es una marca comercial que deba luchar contra marcas rivales, compitiendo para alcanzar los mismos resultados.

HK: En la época del creciente papel de la lengua inglesa en el mundo, haciéndose más y más lengua internacional universal, ¿qué piensa usted acerca del futuro del Esperanto?

LKZ-Z: Mi última frase, probablemente, ya responde su pregunta. Deseo sólo añadir algunas palabras que oí hace algunos años durante una conferencia de prensa, probablemente en Tokio, dichas por un lingüista japonés:

... efectivamente, en inglés o en español las personas se comprenden, pero por medio del Esperanto se relacionan amistosamente...

Sin duda ese dicho es un poquito veraz; eso lo causa el hecho, que Esperanto es no solo una lengua, sino un vehículo de la idea común para interlocutores. Además, como lengua neutral, el Esperanto iguala a los interlocutores no permitiendo ser superior al flanco, cuya lengua usada como internacional, es la lengua materna. En otra ocasión contaré, como mi excesiva fe acerca del conocimiento de la lengua inglesa de mis interlocutores, algunas veces causaron desagradables incomprensiones en mis contactos profesionales....

HK: El Esperanto -como usted mencionó- fue creado como la expresión del continuo esfuerzo de hombres de diversas naciones, religiones y lenguas maternas para poder convivir pacíficamente, fue creado como la expresión de creencia en una tolerancia real. Usted inició, entre otras, la idea de la Medalla de la Tolerancia, que hace realidad la Fundación Zamenhof. La Junta de la Medalla la concedió al Papa Juan Pablo II. ¿Porqué?.

LKZ-Z: La primera Medalla de la Tolerancia será entregada en mano al Papa para honrar sus nobles acciones en el campo del ecumenismo. En verdad el ecumenismo es la expresión de la tolerancia religiosa, expresión de respeto de la Iglesia Católica Romana hacia otras religiones. La Medalla será entregada en mano a Juan Pablo II al final de la liturgia ecuménica de la palabra, al final de la misa, que será celebrada a la vez en siete altares, de siete religiones. Permítaseme mencionar que ya hace casi cien años ZAMENHOF dijo en su "Oración bajo el estandarte verde" que:

Ni ĉiuj de Di' estas filoj...

Kaj jen dum la pontifikeco de Johano Paŭlo la Dua, judoj fariĝis "pli aĝaj fratoj de kristanoj", kaj Esperanto, la lingvo de frateco, sonas ĉiujare dum "*Urbi et Orbi*" sur la Placo de Sankta Petro.

HK: Konkorda kunvivado de diversnacioj, diversreligioj kaj diverslingvanoj, toleremo, eku-menismo - kiel tiuj terminoj rilatas al nia nuntempa realeco - la mondo, en kiu estas ankoraŭ tiom da konfliktoj, malamo, malbono kaj militoj?

LKZ-Z: Des pli tiuj terminoj restas plu aktualaj.

HK: Vi ofte vizitas Bjalistokon. Kiam unuafoje vi vizitis la naskiĝurbon de via granda avo?

LKZ-Z: Tiam mi estis malgranda knabo; mi ne memoras la jaron, sed mi memoras mian kortuŝon, kiam mi vizitis la domon, en kiu mia avo kiel malgranda knabo same kiel mi iam kuradis... Post multaj jaroj mi eksciis, ke la domo, kiu estis kvazaŭ la historia monumento de la urbo kaj ne nur de la urbo, transdaŭrinte la militon kaj du okupaciojn, estis detruita en la 1950-aj jaroj laŭ la ordono de tiutempaj aŭtoritatoj, la ordono estis verŝajne pli nepripensita ol intencita. Mi ĝojas, ke nuntempaj urboaŭtoritatoj de Bjalistoko decidis rekonstrui la domon por ĝi fariĝu la simbolo de la E-lulilo.

HK: Ĉu la fakto, ke vi estas la nepo de Ludoviko Zamenhof, la mondfamulo, helpis aŭ malhelpis en via vivo?

LKZ-Z: Tio sendube donis al mi momentojn de fiero kaj ĝojo, kvankam ĉiutage tio prefere malhelpis al mi. Ankoraŭ kiel knabo, mi malŝatis senĉesajn demandojn de fremdaj homoj similaj al: "Ĉu vi estas parenco de "tiu" ZAMENHOF?". Tiam mi sentis min kiel "pen trita birdo". Kaj poste, en la aĝo de 14 jaroj, mi perdis mian patron, ĉar li estis ZAMENHOF. Dum mul-

*...Cristianos, hebreos y mahometanos
Nosotros todos de Dios somos hijos...*


Y he aquí que durante el pontificado de Juan Pablo II, los judíos se hicieron los "hermanos mayores de los cristianos". Y el Esperanto, la lengua de la fraternidad, suena anualmente durante el "*Urbi et Orbi*" en la Plaza de San Pedro.

HK: Convivencia en concordia de personas de diversas nacionalidades, religiones y lenguas, tolerancia, ecumenismo ¿cómo se relacionan esos términos con nuestra realidad, el mundo, en el cual hay aún tantos conflictos, odios, males y guerras?

LKZ-Z: Tanto más esos términos permanecen más actuales.

HK: Vd visita a menudo Bjalistok. ¿Cuándo visitó Vd por primera vez la ciudad de nacimiento de su "gran" abuelo?

LKZ-Z: Entonces yo era un muchacho pequeño, no recuerdo el año, pero me acuerdo de mi conmoción cuando visité la casa en la cual mi abuelo, cuando era un muchacho pequeño igual que yo, alguna vez corrió... Después de muchos años supe que la casa, que fue como el monumento histórico de la ciudad y no sólo de la ciudad, habiendo atra-



La naskiĝdomo de Ludoviko Zamenhof ĉe la strato Zielona (verda) en Bjalistoko

vesado la guerra y dos ocupaciones, fue destruida en 1950 por orden de las autoridades de aquel tiempo, la orden fue, al parecer, más irreflexiva que intencionada. Me alegra que las actuales autoridades de Bjalistok decidieran reconstruir la casa para hacerla el símbolo de la cuna del Esperanto.

HK: El hecho de que usted es el nieto de Ludoviko Zamenhof, el mundialmente famoso, ¿ayudó o estorbó en su vida?

LKZ-Z: Eso sin duda me dió momentos de orgullo y alegría, aunque a diario eso principalmente me estorbó. Cuando aún era muchacho aborrecía las incesantes preguntas de personas extranjeras por el estilo de: "¿eres pariente de 'ese' ZAMENHOF". Entonces me sentía como un "bicho raro". Después, a la edad de 14 años perdí a mi padre, porque era un ZAMENHOF. Durante muchos años siguientes me esforcé por

taj sekvaj jaroj mi penis vivi "kaŝita"; tio ne sukcesis; mi estis "retrovita" por festi la 100-an datrevenon de Esperanto kaj "venigita" al Varsovio (kaj Bjalistoko) por la Jubilea Kongreso en 1987.

HK: Sinjoro Profesoro, ĉu la pranepoj de Ludoviko Zamenhof konas Esperanton? Ĉu en laŭvicaj generacioj de la kreinto de la lingvo transdaŭros ties kono?

LKZ-Z: Mi ne ŝatas ĉi-specajn esprimojn. Esperanto apartenas al la tuta mondo; ĝi estas neniugrade "propraĵo" de la familio. La pranepoj (fakte la pranepinoj) kaj prapranepoj de ZAMENHOF lernos aŭ ne lernos la lingvon, laŭ ilia deziro, kiel ĉiu alia junulo, kaj ne pro familiaj interligoj.

HK: Ludoviko Zamenhof estas tutcerte la plej konata bjalistokano en la mondo. Kiel granda estas lia nuntempa populareco kaj kiuj simptomoj povas atesti pri tio?

LKZ-Z: Sufiĉas mencii pli ol unu mil monumentoj, placoj kaj stratoj je la nomo de Zamenhof, kiuj troviĝas sur la tuta planedo...

HK: Ni revenu al Eferoj en Bjalistoko. La nomon de via avo portas nia Fondaĵo, Porinfana Klinika Hospitalo kaj Elementa Lernejo n-ro 23. En la urbocentro proksime al la Zamenhof-strato troviĝas obelisko kun lia busto. Ni kalkulas je plua kultivado de la nomo de Ludoviko Zamenhof en nia urbo.

LKZ-Z: La Elementa Lernejo n-ro 23 devus esti, kiel mi komprenis, likvidita pro demografiaj ŝanĝoj en la urbo. En ties ĝisnuna konstruaĵo oni planas fondi Katolikan Liceon, kiu, kiel certigis nin Lia Ekscelenco Pastro Arkiepiskopo Stanislaw SZYMECKI, ĝi plu portos la nomon de ZAMENHOF. Tio estos la bela ekzemplo de ekumenismo, kiun donos al la mondo la urbo BJALISTOKO.

HK: Koran dankon pro la interparolo.

vivir "oculto", eso no tuvo éxito: fui "reencuentrado" para festejar el 100º aniversario del Esperanto y "hecho venir" a Varsovia (y Bjalistok) para el Congreso Jubilar de 1987.

HK: Señor Profesor, ¿los biznietos de Ludoviko Zamenhof conocen el Esperanto? ¿En las siguientes generaciones del creador de la lengua continuará su conocimiento?

LKZ-Z: No me agradan las expresiones de esta clase. El Esperanto pertenece a todo el mundo. No es en ningún grado "propiedad" de la familia. Los biznietos (de hecho las biznietas) y tataranietos de ZAMENHOF aprenderán o no aprenderán la lengua, según sus deseos como cualquier otro joven, y no por relaciones familiares.

HK: Ludoviko Zamenhof es, con toda seguridad, el más conocido "bjalistokano" del mundo. ¿Cómo es de grande actualmente su popularidad y qué signos puede atestiguar acerca de eso?

LKZ-Z: Es suficiente mencionar los más de mil monumentos, plazas y calles con el nombre de ZAMENHOF, que se encuentran sobre todo el planeta...

HK: Regresemos a los asuntos Esperantistas en Bjalistok. El nombre de su abuelo lo llevan nuestra Fundación, la Clínica Hospital Infantil y la Escuela Elemental nº 23. En el centro de la ciudad próximo a la calle Zamenhof se encuentra un obelisco con su busto. Pensamos seguir promocionando el nombre de Ludoviko Zamenhof en nuestra ciudad...

LKZ-Z: La Escuela Elemental nº 23 va a ser, según tengo entendido, liquidada a causa de los cambios demográficos en la ciudad. En su lugar se proyecta fundar un Liceo Católico, que como nos aseguró Su Excelencia el Arzobispo, Padre Stanislaw SZYMECKI, llevará el nombre de ZAMENHOF. Ese será el bello ejemplo de ecumenismo que dará al mundo la ciudad de BJALISTOK.

HK: ¡Gracias de todo corazón por la conversación!

Tradujo al español: Santiago Mulas



Kongresa temo

**Kia kulturo?
Kia paco?
Kia lingvo?**



Tema Kongresual

**¿Qué cultura?
¿Qué paz?
Qué lengua?**

Prelego de Humphrey Tonkin

Kiel unua prezento de la kongresa temo, "Lingvo kaj kulturo de paco", Humphrey Tonkin eldiris jenan prelegon:

La tuta nocio ke unuopuloj povu organizigi por agadi internacie havas relative mallongan historion. Fakte, la Esperanto-movado estis unu el la unuaj tiaj paŝoj. Kvankam ja ekzistis interŝtataj aliancoj pli frue, nur en la dua duono de la 19-a jc. okazis iom sistemaj klopodoj krei internacian kunlaboron ĉirkaŭ internaciaj sistemoj - unue pri transporto kaj komunikado. Ĉiuj ĉi bazigis sur la nocio ke la diversaj ŝtatoj, aŭ formalaj organizaĵoj ene de la ŝtatoj, inter si starigu kunlaboron. Sed ĉe Esperanto, individuoj faris kontakton kun individuoj en aliaj landoj simple por interkomunikiĝi kaj por ek-krei komunan grundon. De la komenco, Esperanto formis internacian kulturon, analogan al naciaj kulturoj, kaj serĉis inter la homoj komunajn valorojn. Ĝi estis profunde revolucia, kaj profunde minaca al la ekzistanta monda ordo.

Zamenhof mem rezistis la ideon ke oni formu formalajn organizaĵojn de esperantistoj, parte ĉar li estis rezista al la nocio de nur unu plia organiza strukturo, en kiu unu landa asocio traktas kun alia landa asocio kaj la individueco de unuopa persono iel perdiĝas en burokratio, kaj parte ĉar li ne deziris altiri sur sian lingvon la nedeziratan atenton de la instancoj.

Starigante sian lingvon, Zamenhof elektis la vojon de lingvo a posteriora, ne nur ĉar aliaj kreantoj de internaciaj lingvoj same agis en tiu epoko, sed ĉar li volis krei semantikan sistemon samtempe kun la leksika sistemo. La decido uzi la ĉefajn lingvojn de Eŭropo por la nova lingvo ebligis al Zamenhof transpreni la bazan semantikan sistemon de tiuj lingvoj. Tio donis malavantaĝon al neeŭropanoj, sed avantaĝon enorme grandan al Esperanto: arte-

Conferencia de Humphrey Tonkin

Como primera presentación del tema kongresual, "Lengua y cultura de paz", Humphrey Tonkin pronunció la siguiente conferencia:

Toda la noción de que los individuos particulares se puedan organizar para actuar internacionalmente tiene una historia relativamente corta. De hecho, el movimiento del Esperanto es uno de los primeros pasos en ese sentido. Aunque ciertamente existieron alianzas interestatales primero, sólo en la segunda mitad del siglo XIX tuvieron lugar intentos algo sistemáticos de crear una colaboración internacional en torno a sistemas internacionales - primero sobre transporte y comunicaciones. Todos estos se basaban sobre la noción de que los diversos Estados, u organizaciones formales dentro de los Estados, establecieran colaboración entre sí. Pero en el Esperanto, unos individuos contactaron con otros individuos de otros países simplemente para intercomunicarse y preparar un terreno común. Desde el principio, el Esperanto formó una cultura internacional, análoga a las culturas nacionales, y buscó valores comunes entre las personas. Fue profundamente revolucionario, y profundamente amenazador del orden mundial existente.

Zamenhof mismo se resistió a la idea de que se formasen organizaciones formales de esperantistas, en parte ya que él se resistía a la noción de sólo una estructura organizativa más, en la cual una asociación nacional trata con otra asociación nacional y la individualidad de cada persona de alguna manera se pierde en la burocracia, y en parte ya que él no deseaba atraer sobre su idioma la atención no deseada de los poderes.

Habiendo establecido su idioma, Zamenhof eligió el camino de lengua a posteriori, no sólo por que otros creadores de lenguas internacionales actuaron igual en esa época, sino por que quería crear un sistema semántico a la vez que el sistema léxicográfico. La decisión de usar las principales lenguas de Europa para la nueva lengua posibilitó a Zamenhof tomar el sistema semántico básico de esas len-

faritan kulturan historion. Helpate de unika gramatika sistemo, iom konata semantika sistemo kaj komuna lingva historio (semantiko dependas de lingva historio: eĉ oni povus diri ke semantiko estas la historio de signifo), la unuaj parolantoj de Esperanto havis je sia dispono fundamentajn elementojn de komuna kulturo.

Turnante sin al hilelismo kaj homaranismo, Zamenhof klopodis iri pli profunden en la homa psiko. Se religio tiel fortas en la homa menso, ĉu ne eblus kunigi la ĉefajn komunajn elementojn en la religioj, ne por krei unu plian, sed por doni komunan spiritan bazon al la diversaj religioj? Homaranismo estis do plia paŝo laŭ la direkto de komuna kulturo.

Tiaj revoluciaj, eĉ utopiaj ideoj ne tiel plaĉis al la praktikaj francaj mezklasanoj, kiuj vidis en Esperanto ŝlosilon al internacia komerco kaj scienca kunlaboro. La fendo inter la mistikismo de Zamenhof kaj la praktikismo de Couturat kaj de Beaufront do montriĝis netranspontebla, kaj tiuj ideoj de d-ro Esperanto kiuj estis vere novaj, iel disipiĝis en la ordinaron de la Esperanto-movado kiu ekestis en postaj jaroj.

Kreante lingvon, do, Zamenhof ankaŭ kreis pensmanieron, en kiu gravis ĉefe (preskaŭ nure) la individuo: ĉe la kerno, ĉe la koro de Esperanto troviĝas du homoj, el diversaj landoj kaj lingvoj, en konversacio neŭtrala kaj egala.

Ĉio alia estas nur margena. Kaj notu ke mi parolas pri konversacio: ne sufiĉas paroli Esperanton, oni devas ankaŭ povi aŭskulti ĝin.

Esperanto celas krei kulturon de paco

Zamenhof estis 20 aŭ 30 jarojn antaŭ sia tempo kiel pensanto pri lingvistiko, sed 100 jarojn antaŭ sia tempo kiel pensanto pri internacia organiziĝo. Hodiaŭ la Tuta Tera Teksaĵo kreas porokazajn organizajn strukturojn kaj senperan komunikadon inter unuopuloj tiaspecajn kiajn Zamenhof iam imagis. Tamen, la ĉefa lingvo de TTT estas la angla lingvo. Ĝi fariĝis la ĉefa rimedo por disvastigi tiun pacan kulturon en kiu la interkomerco kaj la kreo de mondaj merkatoj fariĝis garantio de la paco. La angla estas la lingvo de la internacia elito, kiu profitas el tiu paca komerca kulturo. Kompreneble, la paca kulturo de Anglalingvio ja alportis amasajn avantaĝojn, sed ĝi havas du grandajn malavantaĝojn. Unue, ĝi pli kaj pli homogenigas la homojn. Normoj pri familia vivo, eduko de infanoj, praktikoj en la labormedio, manieroj util-

guas. Eso supuso una desventaja para los no europeos, pero una gran ventaja para el Esperanto: una historia cultural artificial. Con la ayuda de un único sistema gramatical, un sistema semántico algo conocido y una historia lingüística común (la semántica depende de la historia de la lengua: incluso se podría decir que la semántica es la historia del significado), los primeros Esperanto-parlantes tenían a su disposición elementos fundamentales de una cultura común.

Volviéndose hacia el hilelismo y el humanitarismo, Zamenhof procuró profundizar más en la psique humana. Si la religión es tan fuerte en la mente humana, ¿no sería posible juntar los principales elementos comunes de las religiones, no para crear una más, sino para proporcionar una base espiritual común a las diversas religiones? El humanitarismo fue pues el segundo paso en la dirección de una cultura común.

Tales ideas revolucionarias, incluso utópicas no gustaron tanto al los prácticos franceses de la clase media, que veían en el Esperanto una llave para el comercio internacional y la colaboración científica. La fisura entre el misticismo de Zamenhof y el practicismo de Couturat y Beaufront se evidenció insuperable, y esas ideas del doctor Esperanto que eran verdaderamente nuevas, de alguna manera se disiparon en lo ordinario del Movimiento Esperantista que se formó en los siguientes años.

Al crear un idioma, pues, Zamenhof creó también una forma de pensar, en la que importa principalmente (casi solamente) el individuo: en el núcleo, en el corazón del Esperanto se hallan dos hombres, de diversos países y lenguas, en conversación neutral e igual.

Todo lo demás es sólo marginal. Y nótese que estoy hablando de conversación: no basta hablar en Esperanto, también se debe poder escucharlo.

El Esperanto pretende crear una cultura de paz

Zamenhof estaba 20 o 30 años por delante de su época como pensador sobre lingüística, pero estaba 100 años por delante de su época como pensador sobre organización internacional. Hoy el **Tejido Terrestre Total (TTT)** crea estructuras organizativas coyunturales y comunicación directa entre los particulares en la forma que había concebido Zamenhof. Sin embargo, la lengua principal de la TTT es el inglés. Éste se hizo el principal instrumento para difundir esa cultura de paz en la que la comercialización y la creación de mercados mundiales se hizo garantía de la paz. El inglés es la lengua de la élite internacional, que se beneficia de esa cultura comercial pacífica. Por supuesto, la cultura de paz de la comunidad angloparlante ciertamente aportó grandes ventajas, pero tiene dos grandes desventajas. Primero, que homogeniza cada vez más a los hombres. Normas de vida familiar, educación infantil, prác-

igi sian liberan tempon - ĉio ĉi pli kaj pli samiĝas tra la mondo, kreante elitajn kulturon tiel fortan kiel la diversaj etnaj kulturoj. Farante tion (kaj jen mia dua punkto), Anglalingvio kvazaŭ forŝtelas la gvidajn talentojn de la unuopaj kulturoj kaj pli-grandigas la fendon inter tiuj kiuj havas, kaj tiuj kiuj ne havas.

Alternativo al homogenigo

Esperanto konsistigas alternativan kulturon, kiu havas certajn signifajn avantaĝojn. Unue, ĝi ne dependas de ekonomiaj faktoroj je sama grado kiel la angla. Kontraŭ la homogenigo, kiu estas kvazaŭ natura akompananto de la t.n. tutmondiĝo, ĝi potencie povas ŝirmi la diversecon de la kulturoj. Anstataŭ proteste akcepti la dominadon de la angla lingvo, indus ke la neanglalingvaj kulturoj trovu komunan rimedon - nome Esperanton - por doni voĉon al siaj kulturoj kaj por prezenti alternativon al la angla lingvo, tian alternativon al kiu, en ĝustaj cirkonstancoj, estus morale malfacile rezisti eĉ por anglalingvanoj. Tra la mondo nuntempe mortas lingvoj je granda rapideco; ofte mortas kun ili ankaŭ kulturoj. Iasence la perdo de lingvoj paralelas la perdon de biologiaj specioj: la rezulto estas mondo malpli preta fronti la nekonatan estontecon, ĉar malpli riĉa je alternativoj. Indas do trovi metodojn konservi kaj ŝirmi nian diversecon.

Kulturo de paco ne necesigas ke ni ĉiuj pensu same, sed ke ni ĉiuj respektu niajn diferencojn. Ni sukcesas plejparte evoluigi niain rilatojn en la familio aŭ en niaj propraj komunumoj kun kompreno kaj sen perforto. La defio antaŭ ni estas fari samon je tutmonda nivelo.

Kreo de kulturo de paco necesigas akcepton de malsameco, de diferenco, sen la tento simple forfroti tiujn diferencojn. Kiel kredantoj je la valoro de komuna lingvo, ni en multaj kazoj uzas tiun lingvon por transponti malsimilecojn kaj por kompreni ilin. Sen diferencoj, do en mondo sameca, eventuale tiun ponton ni ne bezonus sed tiam mankus ankaŭ la riveroj en kiuj la potenco de la kultura diverseco fluas, kaj per kiuj la floroj kaj arboj de tiuj kulturoj estas nutrataj.

Dua avantaĝo de Esperanto estas ke ĝi ebligas multe pli profundan ekkonon de aliaj homoj kontraŭ simila elspezo de energio kaj tempo (la spiritaĵoj de utiligo de Esperanto estas tre altaj). Oni povas multon atingi per Esperanto sen granda investo. Indas aldoni ke Esperanto estas genia eltrovaĵo, kiu havas pli da elementoj komunaj al

tics en el medio laboral, maneras de utilizar el tiempo libre - todo esto cada vez más se homologa en el mundo, creando una élite cultural tan fuerte como las diversas culturas étnicas. Haciendo eso (y he aquí mi segundo punto), la comunidad angloparlante es como si saquease los talentos dirigentes de las culturas autónomas y agrandase la fisura entre los que poseen y los que no poseen.

Alternativa a la homogenización

El Esperanto constituye una cultura alternativa, que tiene ciertas ventajas significativas. Primero, no depende de factores económicos en tanto grado como el inglés. Contra la homogenización, que es como el acompañante natural de la mundialización, es capaz de salvaguardar la diversidad de las culturas. En vez de aceptar protestando la dominación del idioma inglés, merecería la pena que las culturas no angloparlantes encuentren un remedio común - o sea el Esperanto - para dar voz a sus culturas y para presentar una alternativa a la lengua inglesa, una alternativa a la cual, en apropiadas circunstancias, sería difícil moralmente resistir incluso para los angloparlantes. En el mundo actualmente mueren idiomas con gran rapidez; a menudo mueren con ellos también culturas. En algún sentido la pérdida de idiomas es paralela a la pérdida de especies biológicas: el resultado es un mundo menos preparado para afrontar el futuro desconocido, ya que es menos rico en alternativas. Por tanto merece la pena encontrar métodos para conservar y proteger nuestra diversidad.

Una cultura de paz no requiere que todos nosotros pensemos lo mismo, sino que todos nosotros respetemos nuestras diferencias. En gran medida tenemos éxito en hacer evolucionar nuestras relaciones en la familia o en nuestras propias comunidades con comprensión y sin violencia. El desafío que tenemos ante nosotros es hacer lo mismo a nivel mundial.

La creación de una cultura de paz requiere aceptar la diversidad, la diferencia, sin la tentación de despreciar simplemente esas diferencias. Como creyentes en el valor de una lengua común, ni en muchos casos usamos esa lengua como puente para superar las divergencias y para comprenderlas. Sin diferencias, o sea en un mundo unificado, podría no ser necesario ese puente pero entonces faltarían también los ríos en los que fluye la potencia de la diversidad cultural, y por los cuales se nutren las flores y los árboles de esas culturas.

La segunda ventaja del Esperanto es que posibilita un conocimiento mucho más profundo de otros hombres por el mismo gasto de energía y de tiempo (los beneficios espirituales del uso del Esperanto son muy altos). Se puede conseguir mucho por medio del Esperanto sin una gran inversión. Merece la pena añadir que el Esperanto es un descubrimiento genial, que tiene más elementos comunes

grandaj literaturaj verkoj aŭ al aliaj artaj ĉefverkoj ol al simpla praktika metodo de interkomunikado. Eble venis la tempo defendi Esperanton antaŭ la mondo ne per tio ke ĝi estas lingvo utila al la homo, sed ke ĝi estas poemo kiu ŝanĝas la mondkoncepton. Oni ofte diras ke Zamenhof estis poeto, sed oni ne konsekvence aplikas tiun ideon.

Nia menslarĝiga tasko

Sed ekzistas, potencie, tria signifa avantaĝo: Esperanto ne estas nepre ligita al tiu elita kulturo al kiu mi pli frue aludis. Ni povas per Esperanto konsciigi la mondon pri aliaj homtavoloj, pri aliaj aliroj al mondaj problemoj. La malfortiĝo de la ŝtato kondukis nian movadon al certa krizo pri direkto. Dum ni povis kolektive labori por sukcesigi Esperanton ĉe UN, aŭ persvadi la instancojn enkonduki Esperanton en tiun aŭ alian medion, ni sciis kien iri. Hodiaŭ, tamen, la malnovaj metodoj kaj pensmanieroj ne plu estas adekvataj. Tiun mesaĝon laŭte kaj insiste liveradas homoj tiel malsimilaj kiel Mark Fettes kaj Giorgio Silfer, ĉiu laŭ sia maniero. La homoj kiuj insistas ke Esperanto estas kulturo, socio, komunumo, miaopinie pravas. Sed tio ne konduku al la kredo ke ni ekzistas por ekzisti, ke nia ĉefa zorgo estu uzi niajn rimedojn por ĝui tiujn rimedojn kaj pligrandigi ilin. Konduki tiel estas konduki kiel ŝtato en la unua duono de la 20a jarcento. Nia tasko estu larĝigi la mensojn de la homoj, ŝanĝi la manieron laŭ kiu ili rigardas siajn homajn samspecianojn kaj krei, surbaze de la poezia forteco de Zamenhof kaj lia lingvo, inkluzivan aliron al la problemoj de nia epoko, en kiu neniu homo estu forgesata, neniu homo estu sen espero. Tio estas kulturo de paco.

Mallonge, do: Kia paco? Pli ol simple manko de milito. Kia kulturo? Pli ol simple aro da komunaj interesoj. Kia lingvo? Pli ol simpla limigita komunikrimedo.

Sed pliaj demandoj leviĝas el tiuj tri:

- Ĉu Esperanto estas aŭtentike alia ol aliaj lingvoj? Ĉu ĝi vere povas roli kiel lingvo de la paco?
- Se jes, ĉu ni devas ŝanĝi la metodojn kiujn ni uzas por utiligi kaj disvastigi Esperanton?
- Kiujn konkretajn paŝojn ni povas fari por plifortigi la rolon de Esperanto kiel lingvo de la paco?
- Kiun rolon ni povas ludi kiel privataj civitanoj en la lukto por pli justa mondo kaj la kreo de kulturo de paco?
- Kiel mastrumi mondon de multaj kulturoj kaj multaj lingvoj?

a la grandes obras literarias o a otras obras artísticas que el simple método práctico de intercomunicación. Quizá llegó el momento de defender el Esperanto ante el mundo no por que sea una lengua útil para el hombre, sino por que es un poema que la concepción del mundo. A menudo se dice que Zamenhof era poeta, pero no se aplica consecuentemente esa idea.

Nuestra tarea de ampliación mental

Pero existe, potencialmente, una tercera ventaja significativa: El Esperanto no está indefectiblemente ligado a esa élite cultural que antes aludí. Podemos por medio del Esperanto concienciar al mundo sobre otros estratos humanos, sobre otras enfoques de los problemas mundiales. El debilitamiento del Estado condujo nuestro movimiento a cierta crisis de dirección a seguir. Mientras pudimos trabajar colectivamente para por el éxito del Esperanto en la ONU, o persuadir a los poderes para introducir el Esperanto en tal o cual medio, sabíamos a dónde ir. Hoy, sin embargo, los viejos métodos y maneras de pensar ya no son adecuados. Clara e insistentemente emiten ese mensaje hombres tan diferentes como Mark Fettes y Giorgio Silfer, cada uno a su manera. Los hombres que insisten que el Esperanto es una cultura, una sociedad, una comunidad, en mi opinión tienen razón. Pero esto no conduzca a la creencia de que existimos por existir, que nuestra principal preocupación es usar nuestros recursos para gozar de ellos y aumentarlos. Obrar así sería obrar como un Estado en la primera mitad del siglo XX. Nuestra tarea sea amplificar las mentes de las personas, cambiar la manera en la que ellas miran a sus congéneres humanos y crear, sobre la base de la fuerza poética de Zamenhof y su lengua, un enfoque adicional a los problemas de nuestra época, en la que ningún hombre sea olvidado, ningún hombre quede sin esperanza. Eso es una cultura de paz.

Resumidamente, pues: ¿Qué paz? Más que una simple ausencia de guerra. ¿Qué cultura? Más que un simple conjunto de intereses comunes. ¿Qué lengua? Más que un simple recurso de comunicación limitado.

Pero otras preguntas resultan de esas tres:

- ¿Es el Esperanto algo auténticamente diferente de otras lenguas? ¿Puede él verdaderamente funcionar como lengua de paz?
- En caso afirmativo, ¿debemos cambiar los métodos que usamos para utilizar y difundir el Esperanto?
- ¿Qué pasos concretos debemos dar para fortalecer el papel del Esperanto como lengua de la paz?
- ¿Qué papel podemos jugar como ciudadanos privados en la lucha por un mundo más justo y la creación de una cultura de paz?
- ¿Cómo gestionar un mundo de muchas culturas y muchas lenguas?

KONGRESA REZOLUCIO



RESOLUCIÓN CONGRESUAL

La 85-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Tel-Avivo, Israelo, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto de la jaro 2000-a, kun 1212 partoprenantoj el 61 landoj,

deklaras ke:

- en tiu ĉi Internacia Jaro de Kulturo de Paco necesas refortigi la tutmondajn klopodojn trovi komunajn kulturajn valorojn kaj interkonsentojn cele al konstruo de tutmonda Kulturo de Paco; - tio ĉi okazos nur se en la mensoj de la homoj ni komune kreos tiun kulturon, ĉar daŭra paco estas konstruata nur en la mensoj de homoj;
- en tiu ĉi mondoparto, la Meza Oriento, kie kunvenas malsamaj kulturoj, kaj kie riĉa historio samtempe unuigas kaj dividas homojn, apartaj streboj estas bezonataj kaj jam farataj en serĉado de paco;
- kondiĉo por paco estas la respekto de ĉiuj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj inkluzive de la lingvaj rajtoj de ĉiuj konfliktantaj grupoj;
- la internacia lingvo Esperanto estas kreita ĝuste por ebligi kulturon de paco inter malsamaj gentoj kaj pro sia neŭtraleco kaj pro sia rekono de la digno kaj samvaloro de ĉiuj hom-grupoj ĝi donas grundon, sur kiu valoroj de paco povas flori;

alvokas

ĉiujn internaciajn organizaĵojn, ĉiujn registarojn kaj ĉiujn homojn - ke ili decide ek-respektu la lingvajn homajn rajtojn cele al lingva kaj kultura demokratio en la mondo kaj subtenu la klopodojn de la Esperanto-movado en tiu kampo;

deklaras la pretecon de la Esperanto-movado:

- plulabori por kulturo de paco en la mondo surbaze de reciproka respekto kaj egalvaloro de ĉiuj gentoj kaj hom-grupoj grandaj kaj malgrandaj;
- agi ĉie, kie paco estas minacata, apoge al la ceteraj klopodoj de la internacia komunumo;

esprimas

- sian admiron kaj subtenon al la klopodoj de la homoj de ĉi tiu regiono, kiuj laboras por krei la eblecon de kulturo de paco, kiu estas antaŭkondiĉo por alveni al situacio de paca kunvivado kaj de respekto ambaŭflanka de la homaj rajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj por ĉiuj.

El 85° Congreso Universal de Esperanto, reunido en Tel-Aviv, Israel, desde el 25 de julio al 1 de agosto del año 2000, con 1212 participantes de 61 países,

declara que:

- en este Año Intemacional de la Cultura de Paz es necesario fortalecer los intentos mundiales para encontrar valores culturales comunes y acuerdon con el objetivo de construir una Cultura mundial de Pazo; - esto tendrá lugar sólo si en las mentes de los hombres creamos en común esa cultura, ya que una paz duradera se construye sólo en las mentes de los hombresj;
- en esta parte del mundo, el Oriente Medio, donde se juntan distintas culturasj, y donde una rica historia a la vez une y divide a los hombres, son necesarios y realizados esfuerzos especiales en búsqueda de la paz;
- condición para la paz es el respeto de todos los derechos humanos y libertades fundamentales incluyendo los derechos lingüísticos de todos los grupos en conflicto;
- la lengua internacional Esperanto fue creada precisamente para posibilitar una cultura de paz entre distintas gentes y por su neutralidad y su reconocimiento de la dignidad e igual valía de todos los grupos humanos proporciona un terreno, sobre el cual los valores de la paz pueden florecer;

llama

a todas las organizaciones internacionales, a todos los gobiernos y a todos los hombres - que decidan respetar los derechos humanos lingüísticos para la democracia lingüística y cultural en el mundo y sostengan los intentos del movimiento del Esperanto en ese campo;

deklara la disposición del movimiento del Esperanto:

- a seguir trabajando por una cultura de paz en el mundo sobre la base de un respeto recíproco e igual valía de todas las gentes y grupos humanos grandes y pequeños;
- a actuar en todas partes, donde la paz esté amenazada, apoyando los demás intentos de la comunidad internacional;

expresa

- su admiración y apoyo a los esfuerzos de los hombres de esta región, que trabajan para crear la posibilidad de una cultura de pazo, que es una precondition para llegar a una situación de convivencia pacífica y de respeto por ambas partes de los derechos humanos y de las libertades fundamentales para todos.

**Kuirante kun
PILAR**



**Cocinando con
PILAR**

Pasteão el framboj

Ingrediencoj:

- 20 biskvitoj rostitaj muelitaj
- 125 gramoj da butero
- 1 litro da kremo
- 24 gramoj da ROYAL-gisto
- 1 glaso da lakto
- 1 glaso da sukero

Preparado:

- Fandi la buteron kaj kovri per ĝi la pulvorigitajn biskvitojn.
- Dissolvi la sukeron en la lakton kaj varmigi ĝin; kiam ĝi ekboldas aldoni la kremon kaj la giston.
- Post la boliĝo, retiri la miksaĵon el la varmigilo kaj verŝi ĝin en la ujon en kies fundo troviĝas la biskvita maso.
- Enmeti la ujon en fridujon. Kiam la pasteão malvarmiĝis, oni devas eligi ĝin el la ujo kaj kovri ĝin per pasto el framboj.

Pastel de frambuesa

Ingredientes:

- 20 galletas tostadas molidas
- 125 gramos de mantequilla
- 1 litro de nata
- 2 sobres de cuajada Royal
- 1 vaso de leche
- 1 vaso de azúcar

Preparación:

- Derretir la mantequilla y cubrir las galletas.
- Poner la leche al fuego con el azúcar, y cuando empiece a hervir echar la nata y la cuajada revueltas.
- Cuando haya hervido, se retira del fuego la mezcla y se vierte en un recipiente con el fondo cubierto de galletas.
- Meter en la nevera. Cuando esté fría desmoldar y cubrir con un capa de frambuesa.

Aktivado de nia E-Grupo



Actividad de nuestro Grupo de Esperanto

